# TAGIĜO

ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA

Aperas laŭbezone

Vol. 3

N-ro 1/85 Junio


## EK AL PERFEKTIĜO - KULTURA SEMAJNO

Unu el la ekzistkialoj de nia asocio estas liveri al siaj anoj kondiĉojn akompani la disvolviĝon de siaj fakoj, novaj teknikoj, metodoj kaj aplikoj.

Nia metio estas Esperantumi, kaj do ni ne povas lasi, ke niaj konoj pri Esperanto kadukiĝu

Pro tio, Esperanto-Asocio de Brasília okazigis la februarajn kursojn por instruistoj, invitante Profesoron Geraldo Mattos, el Curitiba, por transdoni al ni parteton de siaj konoj.

Sed perfektiĝo estas ja daŭra laboro, kaj ni do okazigos en julio proksima alian kurson kun alia instruisto kaj alia temo.

El Salvador (BA) venos **LEOPOLDO HENRIQUE KNOEDT** por instrui al ni la ARTON TRADUKI EN/EL ESPERANTO(N), de la 22-a ĝis la 28-a de Julio 1985.

Jen unika ŝanco en la lando perfektigi vian tradukkapablon !

### *** /// Semante, ni rikoltos *** ///

Plenumante unu el la punktoj de nia laborprogramo - okazigo de utilaj kursoj - EAB invitis Profesoron Geraldo Mattos gvidi du apartajn kursojn en nia sidejo: Pedagogia kaj Gramatika Kurso, de la 4/9 Februaro.

Li estas akademiano, verkisto, doktoro pri portugala lingvo, poeto. Do la taŭga persono sur kiu baziĝis nia elekto: elstara lingve kaj profesie. Nigratabulo + kreto + kompetenteco + bonnivela partoprenantaro jen la ingrediencoj kunmiksitaj kiuj ebligis la okazigon de tiuj altnivelaj kursoj.

Dum plene intensiva semajno, 45 homoj el 8 brazilaj ŝtatoj, travivis etoson preskaŭ similan al minikongreso. Tre kvalita kongreso, ni reliefigas: riĉa studado, interŝanĝoj de instru- kaj profesia-spertoj, amikeco, kelkaj ekskursoj, kaj kiel tradicie ĉe ni, adiaŭa balo ĝis la frumateno en agrabla trinkejo...

Post tiu semajno ni konkludis, ke ankoraŭ granda amadorismo regas nian landan Eo-instruadon. Krome, ne multaj homoj kapablas instrui ekskluzive en Esperanto, grandparte, kompreneble, pro manko de kvalifiko kaj prepariĝo. EAB opinias, ke unu el la bazaj laboroj de niaj asocioj estas liveri al la publiko kompetentajn Eo-instruistojn. Minimuma kompetentenco kaj didaktiko nepras por ke tiuj homoj efike instruu la internacian lingvon.


La du okazintaj kursoj estis entute surbendigitaj, kaj oportune transformotaj en taŭgan broŝuron por helpi ĉiun interesaton tiukampe. Ili estis impulso, por ke ni pli klopodu sekvi la vojon de necesa profesiigo kaj kvalito. Evidente tiu profesiigo temas pri bonaj servoj kaj respondeca ekipa laboro, ĉar flanke de la estraro, instruistoj kaj kunlaborantoj ĝi ne inkludas ian salajron aŭ pergajnon.

Laste, tiu 45-homa grupo kaj Prof. Geraldo Mattos konsentis, ke estus sufiĉe utila por la instruado de Esperanto en Brazilo, se ni havus bonegan kompleton da libro por instruisto/lernantoj/taskaro, ĉio surbaze de moderna didaktiko, praktiko kaj simpleco, por esti vastskale uzata kiel modelo en la tuta lando.

## REGIONE

<u>Alto Paraíso (GO)</u> - Valdemir Moreira gvidis elementan kurson de Esperanto en Alto Paraíso. La kurso okazis en la urba gimnazio kaj 51 lernantoj finis ĝin. La instrumaterialo kiun ili uzis estis la metodo de D-ro Carlos Lima Melo. Oni informis, ke en la gimnazio plu okazos Esperanto-kursoj, sed ni atendas detalajn sciigojn.
Esperanto antaŭeniras diversajn urbojn en Goiás, danke al la preteco de Valdemir iri al foraj urboj instrui Esperanton.

REGIONE - <u>Jataí (GO)</u> - S-ino Almeri Clara L. de Natividade, kiu ĉeestis la kursojn de Prof. Geraldo Mattos en nia asocio, komencis elementan kurson en Jataí. La grupo havas 5 personojn, sed alia grupo estas organizota. Menciindas, ke en Jataí jam estis sufiĉe forta movado en la jaroj 1964/66. Ni atendu, ke rezulte de la laboro de S-ino Almeri, la Esperanta-afero denove viglutie.


**OS SÓCIOS RECEBEM UM**  **- venha buscar o seu ! !**

O livro que todo sócio da ABE recebe por direito, está à disposição do mesmo na sede. Poderá ser escolhido entre dois títulos:

1. Historio de Espèranto, 1887-1912;
2. Janusz Korczak, de Alicja Szlazakowa.

Veja o horário de funcionamento da sede da página 5.

---



Kiu estas tiu sindonema sekretariino kiu laboras por Esperanto 24 horojn tage, streĉe, sensalajre en nia asocio ? Telefonu al ni kaj alparolu ŝin. Konatiĝu kun la sekretariino de EAB !

MIND

## B R E T A R E

* La biblioteko jam estas je la dispono de EAB-anoj. Ĝi enhavas 210 titolojn, atendante, ke vi ilin legu ! En ĉiu numero de <u>Tagiĝo</u> ni aperigos resumojn kaj komentariojn pri libroj de nia biblioteko, por ke interesatoj eksciu pri ili, kaj ne-interesatoj interesiĝu...
Ĉi-numere ni aperigas resumon de:

1. ZAMENHOF, L.L. - **Fundamenta Krestomatio**: Londono, The Publishing. 17-a eld. 24-a reimpreso.

"La unua eldono: de <u>Fundamenta Krestomatio</u> naskiĝis en 1903. Ĝi entenis diversajn verkojn originalajn aŭ tradukitajn. Ili plejparte jam aperigis en la Unua Libro, en la Dua Libro kaj ankaŭ en la revuoj <u>La Esperantisto</u> kaj <u>Esperantisto</u> en la jaroj 1889-1895. Ĉiuj artikoloj estis skribitaj de Zamenhof mem, aŭ — se ili estis skribitaj de aliaj personoj — ili estis korektitaj de la aŭtoro de la lingvo. Ĉi tiu libro prezentis do aron da verkoj, tiam konsiderataj modelaj.

Ĉu tiu jam farita juĝo konservas ankoraŭ la saman valoron? Ĉu la nuntempa leganto sentas tian saman plezuron, kian spertis la pioniroj de la frua epoko de Esperanto? Jen gravaj demandoj kies respondoj havas decidan valoron al Esperanto. Jes! Dank'al genio de D-ro Zamenhof ni trovas en la legado de Fundamenta Krestomatio la saman delikatan plezuron kiel la antaŭuloj. La lingvo donacita al la mondo en 1887 estis en tia grado de perfekteco, ke ĉiuj verkoj de la heroa epoko jam sin vestis per definitiva klareco, komprenebleco kaj eleganteco. Ni ŝuldas ankaŭ al la eminentuloj kompetentaj de la lingva komitato kaj de la Akademio, kiuj prudente kaj saĝe gvidis la senrompan evoluadon de la lingvo.

La notoj kaj klarigoj presitaj piede de la paĝoj donas la necesan lumon por juĝi la 60-jaran evoluadon de nia lingvo per la interesa kaj instrua komparo de esprimoj jam uzitaj kun tiuj de la nuna epoko. Verdire tre maloftaj kaj tre malgrandaj diferencoj, al la gloro de Esperanto! Notinde estas, ke la parto poezia, kiu tamen okupas 148 paĝojn en la libro ricevis apenaŭ kelkajn no-

tojn kaj klarigojn.

Resume, ĉi tiu libro kiu aspektas tre bela — parolante pri la bindo, papero kaj tiparo —, estas ankaŭ la ĉiama vera trezoro, kiu ĝojigis la unuajn generaciojn esperantistajn, kaj kapablas ĉarmi la nuntempan generacion. La legantoj trovos en ĝi modelon de stilo imitinda kaj malfacile superebla." **R. Léger**

[Tiu resumo estas parto de recenzo farita de R. Léger, trovita sur disŝirita paĝo de malnova franca Esperanta-revuo, kies nomo ne aperas. Ni opinias la recenzon tre aktuala kaj la komentarioj valoras ankaŭ por la 24-a re-impreso de Fundamenta Krestomatio.]

2. ROHDEN, Humberto. **La Vojo al feliĉo**: kurso de filozofio de la vivo. Rio de Janeiro, Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1984, 89 p.


Filozofia verko, esperantigita de Délio Pereira de Souza, kiu traktas la ĉefan problemon de la homaro: la feliĉo. Respondoj al demandoj pri la ekzisto de feliĉo, ĝia konsisto, kiel ĝin atingi kaj konservi. Tra 20 ĉapitroj estas montrata paŝon post paŝo kiel efektivigi la tutan kompletigon de la homa naturo, la menrealigon de kompleta homo, la kreadon de la "universala homo" — kiu estas vere la feliĉa homo.

FUNKCIADO DE EAB-SIDEJO

lunde vespere: estrara laborkunsido
marde, merkrede, jaŭde, vendrede vespere: Eo-kursoj
sabate de la 2:30 horo posttagmeze ĝis la 6-a horo: ĝeneralaj aktivecoj je la dispono de la membroj kaj vizitantoj.

ALĜUSTIGO - Tagiĝo n-ro 1/84, sur paĝo 5 anoncis la 8an BEJK-n en Cuiabá (MT). Ĝi estis la 7-a. La 8-a BEJK okazos en Porto Alegre (RS).

Telefonn-ro de EAB: (061) 224-8847, je via dispono!




Post produktiva prepariĝo de niaj instruistoj per la februaraj kursoj de Prof. Geraldo Mattos, ni komencis eksperimenti tiun specialan rektan instruon de Esperanto.

Ni starigis 4 kursojn: tri bazajn (Esperanto 1) kaj unu progresigan (Esperanto 2).

La tri instruistoj de Esperanto 1, Heroith Vidal Cunha, Letícia Polisseni kaj Neima Adôrno ekzercas sin dufoje en la semajno, vespere, dum lecionoj de unu horo kaj duono, parolante nur Esperante. Ni klopodas por ke la lernantaro pensu kaj rezonu en Esperanto, komprenu ĉiujn situaciojn kaj difinojn (en baza nivelo), en la lernata lingvo mem. Enirante la lernoĉambron ni nek scipovas nek komprenas la portugalan lingvon...

Dum ĉiu leciono la lernantoj multe parolas, faras taskojn, respondas kaj faras demandojn. Pruvo, ke ili progresas kaj alpropriĝas la lingvon, estas, ke post unu lernomonato, kiam ofte ni ŝercas, ludas, rakontas historietojn, ili spontane kaj inteligente ridas, kaptas la signifojn!

Por tiuj tri kursoj enmatrikuliĝis 26 homoj. Lastmomente, Lética Polisseni, pro sanmotivo, ne plu povis gvidi sian klason. Feliĉe, ke ŝiaj gelernantoj povis transiri al alia klaso sen tre grandaj problemoj.

Esperanton 2 gvidas Roberto Vieira Resende. Enmatrikuliĝis 10 gelernantoj.

En alia okazo EAB prezentos detalan raporton pri la stato de siaj kursoj, metodo, lernomaterialo, lernantaj foriroj, mankoj, sukcesoj, ktp.

**En Gama** s-ro Josias Ferreira Barbosa gvidas elementan kurson de Esperanto en lernejo de tiu sateli-ta urbo, DF. Ĉirkaŭ 150 lernantoj el lia an-gla klaso enskribiĝis por sabata kurso. Tiu kurso estas la unua Eo-kurso en Gama.


**Noto** okazas Eo-kursoj ĉe pluraj spiritismaj institucioj, kaj pri ili ni raportos venontnumere.

## INAŬGURO DE NIA SIDEJO

Ĝi okazis je la 15-a de Decembro 1984, kaj es-tis la oficialigo de nia grava atingo, propra sidejo, kaj omaĝo al L.L. Zamenhof, en lia da-treveno.
Ĉeestis 34 esperantistoj. Ni paroladis, muzikis, kantis, skeĉis. Fotojn faritajn tiam ni ekspo-ziciis en la asocio dum monato, kaj la Grupo de Disvastigado uzis kelkajn en sia laboro. Kon sekvence, revuo Esperanto aperigis artikoleton kaj foton de knabinoj Márcia kaj Estela, kaj El Popola Ĉinio kaj Heroldo de Esperanto (unua paĝe) publikigis noton pri la evento kun fotoj. Ĉe BKE-bulteno kaj BEL-Informas ankaŭ aperis similaj informoj.

## GRUPO PRI DISVASTIGADO

agas. La unua paŝo estis bone plani la labo-ron por ne perdi fortojn, tempon, monon. Se ni laboras metode, la ŝancoj atingi la celojn estas pli grandaj. Nu, ni klopodas agi tiel. La rezulto de la planado estas la "Projekto pri disvastigado de Esperanto en la Federacia Distrikto" (portugal lingve). La rezultoj estas palpeblaj, kaj ni in-tencas prezenti la projekton kaj la rezultojn ati ngitajn ĝis nun, kadre de la 21-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Belo Horizonte.



## 21-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Loko: Belo Horizonte, MG
Dato: 17-21-a Julio
Temo: Survoje al Centjariĝo - Esperanto surstrate

Ĝin organizas Belorizonta Esperanto-Asocio. EAB prezentos tie sian projekton pri disvastigado de Esperanto en la Federacia Distrikto kaj ĝis nunajn rezultojn. Interesatoj vojaĝi grupe kontaktu nin.

**Aliĝoj**

| KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ ĜIS | | 15/04/85 | 30/06/85 | 17/07/85 |
|---|---|---|---|---|
| Kategorio 1 | Plenaĝa kongresano . . | 15.000 | 20.000 | 30.000 |
| Kategorio 2 | Edz(in)o de kongresano | | | |
| en kat. 1 | - Junul(in)o ĝis 21jara . | 7.500 | 10.000 | 15.000 |
| Kategorio 3 | Infano ĝis 12jara . . . | senpage | senpage | senpage |
| Kategorio 4 | Instituċio(esp-ista aŭ ne) . | 30.000 | 40.000 | 60.000 |

### BEJO kunvenis en Brasília

Dum la Sankta Semajno okazis ĉe EAB-sidejo kunveno de la estraro de BEJO kaj ĝiaj kunlaborantoj el diversaj urboj. Ĉeestis sep homoj kaj la debatoj estis ja fruktodonaj. Ni traktis pri restrukturiĝo de BEJO, studo de la jura situacio, laborplano por la Centjaro, k.c.
Nu, almenaŭ la tutlanda organizaĵo de la junuloj ne alkroĉiĝas al la pasinto nek blinde rigardas la nunon kaj la estontecon de nia movado, kaj sin preparas kaj renoviĝas por novaj tempoj

SUDEN SUDEN SUDEN SUDEN ni vojaĝos en la venonta januaro, por partopreni en la 8-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, Porto Alegre, RS !

**Alvoko al komuna libro!**

# ANTAŬ LA NOVA JARMILO

## Ideoj por la vivo el mondo minacata

Ni Esperantistoj, klopodante krei ponton de amikeco inter la homoj kaj helpi forigi la minacon de ĉia nekomprenemo, apartenas kaj nepre apartenu al la batalantoj por la vivo. Do, ĉi tiu libro estos nia libro.

Ĝi estas eldonota okaze de la Jubilea Jaro 1987 kaj prezentu tutmondan sumon de pensado, sentado, pritaksado kaj programado. La ĉarmo kaj ekscito de la planata libro estu en tio, ke homoj el la plej diversaj kontinentoj, landoj, kulturoj, el malsamaj situacioj, havantaj plej diferencajn religiojn, ideologiojn kaj idearojn, esprimu siajn proprajn pensojn kaj sentojn pri la supre donita temo.

„Por la vivo" ne nepre signifu nur „optimisma". La kontribuajoj povas tuŝi ĉiun kampon de vivo (kaj malvivo), kondiĉe ke ili koncernas la esencon de la temo. La formon ĉiu kontribuanto elektu laŭplaĉe: eseo, poemo, rakonto, satiro, sciencfikcio, programo ktp., kiel originalo aŭ traduko. Unuavice la libro estu peresperanta, ne priesperanta. Povas partopreni ĉiuaĝuloj. La unuopa teksto ampleksu ne pli ol dudek paĝojn (DIN A4 aŭ similformata leterpaperfolio). La libro reprezentu diversajn sintenojn kaj pensojn de la Unua, Dua kaj Tria Mondoj – do nenia cenzuro aŭ kritiko rilate la enhavon aperos en ĝi. Principe ĉiuj kontribuajoj plenumantaj la ĉi tie donitajn kondiĉojn, estos aperigataj: ĉar ni scias, ke la vivokampo estas vasta, ankoraŭ, sufiĉe vasta por pravigi ĉi tian ampleksan libron. Limdato laŭpoŝtstampa estas la 30-a de septembro 1986. Mallonga priskribo de la aŭtoro estu aldonita.

Respondecas pri la kompilado (al ili bv. sendi la kontribuajojn):
D-ro W. Gunther, Friedrich Ebert-Str. 149, D-3500 Kassel, FR Germanio, tel. 0561-14931.
Helmut Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio, tel. 06421-25856.
Eldonas: Esperanto-Centro, Hermann Behrmann, poŝtfako 1450 (Gruningerstr. 5), D-4790 Paderborn, FR Germanio, tel. 05251-17612

ALVOKO

AL

KOMUNA

LIBRO !

Jen partopreninda projekto. Ĉu ni, brazilanoj, respondos al la alvoko ?

EAB planas kunvenon por diskuti la ideon, kaj se ĝi altiras vian literaturan emon, kontaktu nin.

La informojn ni prenis el MONATO, n-ro 7, 9/84.

**APLIKO** - en ĉi tiu rubriko ni aperigos artikolojn montrantajn la uzon kaj aplikon de Esperanto. Ĉiu kontribuo estas bonvena.

## Meios e oportunidades para a prática do Esperanto, em sua expressão oral

Muitos esperantistas queixam-se da falta de oportunidade para praticarem o Esperanto, em sua expressão oral.

Resolvi, então, comentar aqui algumas idéias que muito ajudariam e facilitariam a prática da conversação no idioma de Zamenhof.

A primeira idéia seria a conversa em grupo, com outros esperantistas (konversacia rondo); outra idéia seria a audição de programas de rádio em esperanto: o de maior duração é o da Rádio Pequim, mas que requer um bom receptor e uma boa antena externa; tratá-se de programa diário, às 19:30 horas, de Brasília, nas freqüências de 11515 e 15 600 KHz; em Sorocaba (SP) há um programa local e há outro também local, no Rio de Janeiro, ambos de curtíssima duração; outra idéia, talvez a mais eficaz, seria a "radioamadorização" dos esperantistas, ou seja, o processo de os esperantistas tornarem-se radioamadores.

Quanto a esta "radioamadorização" dos esperantistas, há alguns comentários a fazer: os equipamentos são geralmente caros e há que se aprender regras e procedimentos peculiares ao Serviço de Radioamadorismo. Para se lutar contra o custo do equipamento, há três caminhos: 1) criar grupos de radioamadores esperantistas que possam partilhar uma estação entre si; 2) "esperantizar" amigos/colegas radioamadores e eventualmente fazer uso de suas estações; e 3) adquirir equipamento em leilões ou de segunda ou terceira mão, que, no entanto, estejam funcionando razoavelmente.

A principal vantagem do radioamadorismo, a meu ver, é que ele oferece uma possibilidade quase ilimitada de contatos diretos e instantâneos com esperantistas de todo o País e também do exterior (para as classes B e A); no radioamadorismo ocorre uma interação imediata entre os interlocutores; não é como no rádio e televisão comerciais e no cinema, onde a mensagem é veiculada numa só direção: um fala e/ou gesticula e o outro <u>APENAS</u> vê e/ou ouve, passivamente.

→

→ Por último, há ainda a possibilidade de se implementar o serviço telefônio DISQUE-AMIZADE em Esperanto, nas cidades onde o número de esperantistas justifique tal iniciativa.

**Mário Fonsêca (PU2 AML)**

---

## PERIODAĴOJ EN ESPERANTO

o OVO = tiu estas nova esperantista gazeto aperinta en la pasinta jaro, kiu celas principe la komencantojn kaj junularon. Ĝi enhavas diversaspecajn artikolojn pri strangaĵoj, nekonataĵoj, interesaĵoj kaj ankaŭ daŭrigromanoj, rakontoj, rebusoj, ktp. OVO esta do, tre valora revuo.

o MONATO = kun la subtitolo "Internacia Magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo", MONATO havas ĉirkaŭ 200 konstantajn kunlaborantojn el 40 landoj. En ĝiaj ilustritaj paĝoj aperas nur artikoloj originale verkitaj en Esperanto pri temoj rilataj al la subtitolo kaj aliaj pri diversaj interesaĵoj.

o LA KANCERKLINIKO = tiu estas neordinara magazino kiu amuze kaj ridindige pritraktas kulturajn, politikajn kaj skandalemajn okazaĵojn, spite al la opinio de ĉiu ajn. Ĝi ankaŭ montras kelkajn realaĵojn kaŝitajn malantaŭ tro optimismaj artikoloj el aliaj periodaĵoj. La Kancerkliniko intencas esti libera kaj sendependa revuo por tiuj kiuj ŝatas amuziĝi per satiraĵoj kaj anekdotoj.

o KOMENTARIOJ PRI PIB = tre laŭdinda la laboro de esperantistoj kiuj partoprenas de la Banko de' Brazilo, eldonante bravan bultenon, nome PIB Pionira informbulteno tute en Esperanto, celas unuigi la samideanojn de tiu granda entrepreno disigita tra la tuta lando. PIB estas malgranda dumonata bulteno kies enhavo estas riĉa pro sia diverseco kaj legfacileco.

---

Em 1979, 1980 e 1981 o TAGIĜO teve várias edições voltadas para a divulgação do 66º Congresso Mundial de Esperanto e informações sobre os preparativos do mesmo. A ABE não possui exemplares nem os originais desses números. Solicitamos a quem os tenha recebido e conservado que nos faça um empréstimo para que possamos reproduzí-los para o acervo da ABE.

LIBROSERVO - libroamantoj vizitu la etan libroservon de EAB. Ĝi ankoraŭ havas bonegajn librojn kaj varojn (movadajn, lingvajn, distrajn, religiajn, T-ĉemizojn). Inter proksimume 70 titoloj troviĝas "La Trofeoj", de José Maria de Herodia (franca akademiano), "Planlingvaj Problemoj", de William Gilbert, k.a.

## KIOM DA MEMBROJ EAB HAVAS ĜIS NUN ?

Ĝis nun EAB havas 45 membrojn. Kompare kun aliaj jaroj tiu kvanto estas alta, sed kompare kun la kvanto de esperantistoj en la urbo ĝi estas nur akceptebla.
Pri la kampanjo por alvenigi anojn ni plenumis nur la unuan parton. Ĝi estas trietapa, kaj ĉiuj ili estos plenumitaj, laŭ paŝoj de la projekto pri disvastigado de Esperanto en la Federacia Distrikto. La celo esta sukcesigi ĝis oktobro 1985, 250 membrojn por nia asocio.

## POUPANÇA ESPERANTO

Foi iniciada com a finalidade de conseguir fundos para o mobiliamento da sede e implementação dos cursos da ABE. Essa iniciativa conseguiu o apoio de 50% das pessoas contactadas pela diretoria. Financeiramente atingiremos 2/3 do total planejado e não poderemos adquirir todos os objetos listados no projeto, porém o estamos fazendo em grande parte.
Uma reunião da diretoria da ABE com os contribuintes da poupança será marcada, para que a primeira possa apresentar os resultados obtidos até agora.